Laŭzana Esperanto-Societo
Marto 2020 - n-ro 3

# Laŭzana informilo

*Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe :* ***eventaservo.org/o/LES***

## *Venontaj kunsidoj:*

- Lu, la 6-an de aprilo
  *Markus Sanz prelegos.*
- Lu, la 4-an de majo
  *Karlota prelegos.*
- Sa, la 20-an de junio
  *Ekskurso.*

**Lunde, la 2-an de marto, je la 20-a**

## Venu kun viaj demandoj

**en la kvartaldomon « *Jaman 8* » en Clarens – Montreux.**

**Ni provos respondi al viaj gramatikaj problemoj.**

### Informoj el la protokolo (AĜ 2020)

- Partoprenis 15 aktivaj membroj kaj 2 kandidatoj; 10 senkulpiĝis.
- La kapitalo de nia kaso fine de 2019 estis de preskaŭ CHF 2500.-
- Guillaume Fontaine, Denis Maret, Lucie Favre, Catherine Bremaud, Melody Sutter kaj Pierre Boizot estas akceptitaj kiel aktivaj membroj.
- La komitatanoj konsentas daŭrigi sian laboron kaj estas elektitaj per aplaŭdo.
- La membraro decidis kunsidi ĉiudumonate aŭ en Clarens-Montreux aŭ en La Tour-de-Peilz.
- Ni ekskursos la 20-an de junio en la Kastelon de la Sarraz kaj vizitos la Muzeon de la Ĉevalo.
- Nia societo ĉeestos kun la ĝenevanoj en la Inventista Salono en Palexpo – Ĝenevo inter la 25-a kaj la 29-an de marto. Ni projekcios niajn filmojn.
- Charlotte petas ne plu okupiĝi pri la biblioteko de nia societo. Pierre Boizot konsentas daŭrigi la laboron. Ni dankegas ilin.
- En Ĝenevo, la Kasta Festo-anoj atendas nian viziton.

Francisko Randin

*Vizitu nian agendon surrete kaj notu la datojn:* ***eventaservo.org/o/LES***

**Laŭzana Esperanto-Societo**
pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com …*esperantolausanne*
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

**Komitato 2019**
Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Nia programo aperas en** https://eventaservo.org/o/LES

### Babiladaj Rondoj

**ambaŭgrupe:**

**Vendrede, la 21-an de februaro**
**Vendrede, la 20-an de marto**
ĉe Knud kaj Marie-Antoinette
079 210 97 75

**okcidente:**

**Vendrede, la 6-an de marto**
ĉe Monique kaj Giulio
079 754 21 60

**oriente:**


**Vendrede, la 13-an de marto**
ĉe Cléa kaj Jean-Marie
079 330 04 03

### Ĝenevaj renkontiĝoj:

**22-a Kasta-Festo**
**Sabate, la 29-an de februaro**
je 18h, rue de Montbrillant 20
*Familio Sans 022 349 01 86*
*1001bornes@gmail.com*

**Lunda Grupo**
**ĉiuj lundoj je 18h por babili**
Restoracio *Le Galicia*, rue des Gares 21
*charmiam.common@orange.fr*

***Inventista Ekspozicio en Ĝenevo***
Ni serĉas deĵorantojn, kiuj konsentas ĉeesti surloke inter la 25-a kaj la 29-an de marto. La elspezoj de la LES-anaj volontuloj estos pagitaj.




HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Blua spaco super nia kapo (akuzativo); 6. Scienco havas ___ enuan, sed frukton bonĝuan; 11. Metis ordon; 12. Ne estigi certa; 13. ___ sinjoro (komence de letero); 14. Simila al brila blanka globo; 15. Frakcio kun numeratoro egala al unu; 16. Senti bezonon trinki; 17. Lingva kodo de Esperanto; 18. Difina artikolo; 19. Don Giovanni estas ___ de Mozarto; 20. Tut-Tera Teksaĵo; 21. Dividiĝas nur per si kaj per 1; 22. Klopodi, streĉi; 23. Pasinta ___ for el memoro; 25. Metodo de pago (akuzativo); 26. La ĉefa dio en la ĝermana mitologio; 27. La ekstera parto de la suna atmosfero.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Dolĉa manĝaĵo farita el kakao; 2. Rilata al Persujo; 3. Faco de solido; 4. Mia, via, ___ ; 5. Simbolo por osmio je kemio; 6. Ŝaŭmo kaj tumulto de marondoj; 7. Esti ebla; 8. ___ , via, lia; 9. Komenca duono de ogro; 10. Venena alkaloido, ekstraktata el tabako; 12. Alveno (kontraŭo); 14. Versa verko; 16. ___metro estas aparato, per kiu oni mezuras la aervolumenon; 17. Homgrupo konscia pri siaj diferencoj (akuzativo); 19. Havas simbolon Au (akuzativo); 20. Apo___ = farmacio; 21. ___-malpli = ĉirkaŭ; 22. Prepozicio montranta instrumenton, materion aŭ objekton; 24. Komenca duono de odro; 25. Komenca sillabo de ĉokolado.



# Karlo de Edmond Privat — dektria ĉapitro: *Sur la rivero*

La jaroj rapide forpasis kaj Karlo ĵus eniĝis en la gimnazion, kiu estas la pli alta parto de la liceo. Preskaŭ la samajn kamaradojn li havis kiel en la unuaj jaroj. Malmultaj forlasis la lernejon kaj nur unu novulo envenis en la klason de Karlo. Janko ĉiam estis lia fidela amiko kaj lin nun ofte hejmen venigis por diskutadi kaj esplori librojn. Jam de unu jaro Man ne plu sidis apud Karlo, sed estis anstataŭita unue de Laminde, due de Servetti kaj fine de Janko mem.

Iun matenon en somero estis tiel varme en la klaso, ke preskaŭ ĉiuj ekdormis. Janko diris al Karlo: "Estas neeble restadi tie ĉi, ĉu ni foriru? — Kien? — Ien ajn. Sur la riveron, ekzemple, ni povus lui boaton." Karlo kompreneble entuziasmiĝis je la ideo, kvankam li timis iomete.

Inter du lecionoj, kiam ĉiuj aliaj iris momenton babiladi aŭ kuradi en la korto, ambaŭ rapide trapasis la pordegon kun Servetti, kaj tuj aliris la angulon de la plej proksima strato. Neniu estis vidinta ilin. Ŝajnis strange al Karlo promenadi en la urbo matene. De tiom longe li tion ne faris estante ĉiam en la liceo je tiu tempo.

Ili iris al la bordo de l' rivero. Ili baldaŭ alvenis al boatejo. Janko elektis mallarĝan boaton kaj sidiĝinte, ili ekremis norden. Servetti opiniis, ke estus pli amuze remi komence kontraŭ la fluo de l' rivero kaj reveni poste tute ne remante. Lia propono estis tuj akceptata. La vetero estis belega: sur ambaŭ bordoj de l' rivero la kampoj kaj arbaretoj estis tre verdaj kaj tute dezertaj. Nur la birdojn oni aŭdis kaj la regulan bruadon de la remiloj.


Baldaŭ ili pasis tra loko, kie grandaj salikoj klinitaj super la rivero banis siajn branĉetojn en la akvo. La knaboj malrapidigis sian remadon. Estis dolĉa silento. Ili pensis pri siaj kompatindaj kamaradoj, nun lernantaj grekajn verbojn en la klaso.

Karlo estus dezirinta reveni por la lasta leciono je la dekunua, ĉar li tre amis la profesoron de historio. (Tiu estis la altkreska viro kun bela nigra barbo, kiu diktis la ekzamenajn demandojn, kiam knabeto Karlo la unuan fojon sidis sur benko de la liceo). Eltirinte sian poŝhorloĝon, Karlo ekvidis, ke estas jam tro malfrue.

Ili forlasis la remadon, kaj la boato malrapide kaj dolĉe suden iris portate de la riverfluo. Ili ekkantis, kaj ilia voĉo ĝoje sonis inter la arboj. Jam la domoj de la urbo ekaperis inter la branĉoj kaj baldaŭ ili realvenis al la boatejo.

Ĉiuj rapidis hejmen, ekpensante pri tio, kio okazos, kiam ili reiros la liceon posttagmeze. Ĉe angulo de strato Karlo renkontis . . . la profesoron de historio. Li forprenis sian ĉapelon. La profesoro haltante nur diris: "Bonan tagon, Davis; vi venu al mia domo morgaŭ je la kvara kaj duono; mi havas ion por diri al vi." Kaj li forpasis.

# Intervjuo de François Randin, Sekretario de LES



(Fare de Rosario)

*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi naskiĝis en 1951 en la *Mezo de la Mondo*, en Villars-Lussery. Mia zodiaka signo estas "Pesilo"; mi ne karakterizas min kiel hezitemulo; male mi ĉiam scias "pesi" la plej bonflankon por mi.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**Kiam mi junaĝis, esperantistaj geamikoj parolis al mi pri "lingvo". Mi suficîe suferis enlerneje pri la germana kaj la angla studoj kaj tiutempe surdis.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Dek jarojn post mia geedziĝo, la amikoj re-propagandis dirante : *« Por vojaĝi … pli bonas ol la angla. Provu studi ĝin, tre simplas. Vi ne bedaŭros. »*. Kaj en 1995 …**

*- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Ĉiuj sciis, ke mi ne ordinarulas, do … eĉ mia edzino preferis studi la hispanan. Mi do decidís sekvi sole la kursojn de la infaninstruistino Nicole Margot.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Miaj gefiloj sekvis miajn kursojn: mia filo seslingve kapablas uzi … paroletas e-on sed mia filino diris: *"Dankon, mi vidis, ke estas interese, sed por mi … sufiĉas."***

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**Jes en 1995 mi iris al Tempero kun mia filo. Mi preskaŭ ĉiujare partoprenas la UK-on. Ĉi-jare mi voĵaĝos kun Viviane al Montrealo. Ni loĝos ĉe Vahid, kiu ĵus patriĝas.**